FN PER ANC 47

N° 230 APRILO 2007

NORMANDA ESPERANTO BULTENO

# ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas :Pierre Lemarchand, 2 les Terres Quemines 76113 Hautot sur Seine. Tel. 02 35 34 28 78
LEMARCHANDPI@wanadoo.fr
Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.

esperanto Normandie


## Ni kunvenis en Grand Quevilly

Delegitoj de Supra kaj Malsupra Normandio partoprenis Ĝeneralan Kunvenon en Grand Quevilly. Nombro de partoprenintoj (13) kaj enkalkulo de 22 rajtigiloj ebligis leĝe organizi tiun jaran rendevuon.

Misioj de Esperanto-Normandio estis redifinitaj. Dank al lokaj agadoj de grupoj, nia Asocio vigliĝas. La federacia ago estas organizo de turneoj de prelegantoj, eldonado de bulteno, disponigo de materialoj por informado.

Rilate kun antaŭa biro, estis konstatita la jeno: La membraro stagnas. Kvankam ni inspiris nin de statutoj de Esperanto-France, ni ankoraŭ ne findecidigis por kontrakto kun nacia organizo.

Morala kaj financa raportoj estis unanime aprobitaj. Ĉeestintoj raportis pri projektoj de lokaj asocioj. Rouen nun plie proponas semajnan kurson



per radio en Mont Saint Aignan. Havro pludediĉos al instruado por interesantoj kaj zorgas pri ĝisdatigo de reta « gvidilo ». Hérouville ĉefe dediĉas al turneoj de prelegantoj. Yvetot partoprenis Eŭropan Semajnon de la 2a ĝis la 9a de Aprilo. Migra ekspozicio estis prezentita en Junulardomo. Dialoga kunveno okazis la 5an de Aprilo ek de la 18a horo. La Asocio ŝatus konkretigi interrilatojn kun ĝemelurboj per Internacia Lingvo.

Regionaj projektoj estas antaŭvidataj : .....



Ĝenerala Kunveno 2007a

### En tiu numero :


| | |
|---|---|
| Agadoj en Yvetôt. | 2 |
| Radio-kurso en Rouen. | 2 |
| Kelkaj eĥoj el Le Havre. | 3 |
| Sat-Amikara Kongreso en Artigues apud Bordeaux. | 3-6 |
| Ĉu vi deziras forigon de dimanĉoj ? | 4-6 |
| Financa raporto 2006a | 5 |
| Kotizintoj por 2007 | 5 |



Restoracia paŭzo en Grand Quevilly

- Propono pri semajnfina staĝo.
- Akiro de porinforma materialo al grupoj.
- Ebla kreo de regiona ttt-ejo.
- Relanĉo de kontaktoj kun Germanaj Samideanoj de Malalta Saksio.

La nova estraro konsistas el :

- Sébastien ERHARD Prezidanto.
- Yves NICOLAS Vicprezidanto.
- Pierre QUILLAUD Sekretario.
- Pierre LEMARCHAND Kasisto + Bulteno.
- Aliaj membroj estas la delegitoj de la lokaj asocioj.
- Pierre JOUVIN kontrolos la asociajn kontojn

Sylvie CARON

# Agadoj en YVETOT

La Eŭropa Semajno, en kiu partoprenis diversaj asocioj el Yvetôt, okazis de la 3a ĝis la 7a de Aprilo. Kompreneble nia grupo organizis ekspozicion pri Esperanto en la Junuldomo dum la tuta semajno, kaj informparoladeton ĵaŭdon, la 5an de Aprilo de la 18h30 ĝis la 20a. 10 personoj el Yvetôt, Le Havre kaj Pavilly ĉeestis tiun kunvenon, sed bedaŭrinde ili estis ĉefe jam konvinkitaj, tamen feliĉe, la morgaŭan tagon, dum la lasta kunveno, kiu estis dediĉita al la Ĝemeliĝa Komitato, rimarko farita ĵus antaŭ la fino de la diskuto, subite okazigis tre interesan debaton pri la lingva problemo, en kiu pluraj personoj interesiĝis tiome, ke ili petis ke la ekspozicio daŭru kelkajn tagojn plue. Ni do esperu, ke tiu neatendita sukceso daŭru kaj fruktodonu !

Dum la ĵaŭda paroladeto, je la fino, okazis rekte prezentado de la ĉiutaga uzo de la Internacia Lingvo pere de Internet.

Pierre POTTIER



# Rouen - regiono

Sébastien ERHARD continue avec brio son cours sur Radio Campus, tous les mardis de 18h à 19h. Pour animer l'émission, vous pouvez appeler l'animateur au 02 32 76 92 05, cela lui fera plaisir. Comme ils ont libre antenne, l'ambiance est très relachée !!! Ceux qui ne peuvent pas capter Radio Campus peuvent écouter les premières émissions par internet sur http://esperanto.tempo.free.fr




Catherine DOMINGO (T. 06 08 25 16 43) poursuit un cours de perfectionnement, un mardi sur deux de 18h30 à 20h30 dans les locaux de la librairie « L'Insoumise » rue Saint Hilaire, Rouen rive droite .

# Kelkaj eĥoj pri Havra Grupo

Krom tradiciaj kontakteblecoj kun delegitoj de nia asocio, nia klubo havas retadreson Kontakto@tele2.fr. Ĝi daŭre estas legebla sur htt:// esperanto-lehavre.org. Por eksterlandaj esperantoparolantoj kaj vojaĝemuloj, ĝi proponis turismajn slipojn pri Normandaj vidindaĵoj kaj invitas al ĝisdatiĝo de novaj kontakejoj en Esperantujo sur www.gvidilo.org.

Pri antaŭenirado de nia afero, ni varbis ene de firmaoa medio de havra kunurbaĵo. Plurpanela ekspozicio vekiĝis intereson en la mediatoteko de la entreprenoj. Ankaŭ, nia Asocio estis petita de kulturaj aŭ sociaj organizoj. Interkonsente ni proponas dialogan prezentadon al interesuloj.

Almenaŭ ĉiujare, ni akceptas eksterlandan prelegaton. Pasintan januaron, ni konatiĝis kun Mukunda kaj Pathik WAGIE, kiuj prezentis sian landon okaze de kunveno malfermata al ĉia publiko. Se neesperantistoj ŝajnas tro timemaj, ni havis favoran artikolon en loka gazetaro.


De oktobro ĝis junio, niaj klubanoj pluperfektiĝas ĉiusemajne en salono Cassin, ĵaŭde de la 18h00 ĝis la 19h30, strato Jules Lecesne.

Vizitontoj en Havro, vi estos bonvenaj ĉiun trian sabaton de monato ( De la 17h00 ĝis la 19h00 ) en « Hôtel des Sociétés Savantes ». Ni volonte interŝanĝos niajn spertojn ĉu ne ?

*Sylvie CARON*

*Strat-panelo en la urbo **Le Havre**.*

*La nomo de tiu strato datiĝas de 1956*




# Kongreso de SAT-AMIKARO en Artigues apud Bordeaux

- Ses membroj de Esperanto-Normandie partoprenis tiun kongreson de la 7a ĝis la 10a de Aprilo. Sukcesa ĝi estis pro la bona organizado kaj pro la bela vetero kiu ĝojigis ĉiujn. Jam dufoje, Sat kaj Sat-Amikaro organisis kongreson en tiu tre taŭga loko de « Maison de la Promotion Sociale » kie eblis malmultekoste dormi, manĝi kaj diskuti en komfortaj salonoj. La nombro da kongresanoj estis 250 el kiuj 20 eksterlandanoj. La debatoj estis interesaj ĉar la kongrestemo estis : « Esperanto kaj la aliaj alternativaj movadoj » Ĝi celis montri ke la esperantista movado kapablas agi, kunlabori, kun aliaj asociaj aktivuloj kiuj same batalas por la homa progreso. Venis kaj prelegis :
- La Asocio de Naturamikoj.
- La NEF (Nouvelle Economie Fraternelle) kiu estas banka entrepreno sed precipe financa kooperativo kiu uzas monon de ŝparantoj por projektoj respektoplenaj de la homoj kaj medio.
- Biologia Agrikulturo : Venis ĝirondiaj vitkulturistoj ; ili klarigis kial ili elektis la biodinamian metodon kaj gustumigis siajn vinojn.
- La AMAP-asocioj (Associations pour le maintien de l'agriculture paysanne) Helpo al la kamparana agrikulturo. Aparteni al AMAP-asocio estas elekti novan vivmanieron kiu respektas homon kaj ties vivmedion. Temas pri humanisma filozofio, certe multe similanta la esperantistan.
- Accueil Paysan : La « Kampara Akcepto » estas reto de kamparanoj ekzistanta en Francio kaj en 19 aliaj landoj kiu proponas turisman kaj socialan akcepton en siaj farmbienoj.
- Kamparana Konfederacio : ĝi estas sindikato fondita antaŭ 20 jaroj por defendi la kamparanojn kaj specon de ekologia agrikulturo. (Tute ne temis pri la kandidato José Bové).

*Sekvo paĝo 6a*

# Ĉu vi deziras forigon de DIMANĈOJ ?



Kelkaj opinios : « Li ne plu respondecas pri redakto de Normanda Bulteno kaj li profitas sian novan situacion por verki polemikan artikolon. »

Tiel ne estas ! Sed mi konstatas ke niaj legantoj estas pli kaj pli malkuraĝaj por « nutri » nian komunan ligilon kaj necesas veki ilin por faciligi la taskon de la nova redaktoro. Nia bulteno ne konsistu el nuraj komunikoj pri kongresoj, pri abonoj, pri kotizoj kaj el legaĵoj ĉerpitaj en aliaj revuoj. Vi ĉiuj kontribuu vivantigi la bultenon ; se vi estas komencanto, ne timu erari ; la redaktoro korektos vian stilon, se necese.

Do vi ne konsideru ĉi-suban artikolon kiel polemika sed kiel instigilo al respondo ĉar viaj opinioj povas malsimili miajn kaj vi deziros respondi en sekvonta bulteno.

Kion vi faras dimanĉe ? La respondoj povas esti tre diversaj, laŭ la aĝo, la familia situacio, la sezono, la vetero, la interesoj, la gustoj, ktp... Ĝenerale, dimanĉe matene, homoj ne bezonas rapidi por iri al laborejo aŭ al lernejo kaj nature vekiĝas kaj ellitiĝas pli malfrue. Kelkaj sportumas, kelkaj iras al bazaro (*) aŭ al diversaj malgrandaj vendejoj por aĉeti freŝajn manĝaĵojn, florojn, panon, kukojn... Katolikoj iras al preĝejo. Tagmeze, la manĝajoj estas pli bongustaj ol dum la semajnaj tagoj en fabrikrestoracio. Posttagmeze, pieda promenado tra arbaro, aŭ longe de rivero en belega turisma loko, aŭ veturado al marbordo, aŭ aŭskultado de muziko, aŭ legado de interesa libro ktp... La distraj temoj ne mankas kaj estas tre diversaj por homoj kiuj interesiĝas pri kulturo, pri naturo, pri multaj interesaĵoj. Kaj tio okazas en familia kadro kun edz(in)o kaj gefiloj kaj eventuale kun ge-nepoj.

Ne ĉiuj tiamaniere pasigas la dimanĉojn. Multaj laboristoj devas deĵori dum tiu ripoztago. Ĉar ilia tasko estas nepre necesega por tuta socio. Kuracistoj, flegistinoj en hospitaloj, policistoj, kondukistoj de trajnoj, de busoj, de aviadiloj, laboristoj de gravaj fabrikoj kie neeblas malfunkciigi maŝinojn, gardistoj de muzeoj kaj aliaj distrejoj, etkomercistoj...ktp. La listo jam estas longa sed ĝi konsistas el homoj kiuj libere elektis tiajn profesiojn, sciante ties avantaĝojn kaj malavantaĝojn.

Sed nun, oni sentas ke iuj, por pligrandigi profitojn, kaj je la nomo de libereco ( infero estas tegita de bonaj intencoj ) deziras plilongigi la liston de dimanĉaj laboristoj. Kampanjo estas lanĉita de supermagazenoj por esti malfermataj dum ripoztagoj : jam ili estas malfermataj dum feriaj festoj kaj finjaraj dimanĉoj sed ili celas esti malfermataj dum pli kaj pli da dimanĉoj, kaj se eblas dum ĉiuj dimanĉoj . Ili pretendas ke tio estus favora por nacia ekonomio kaj por redukto de senlaboreco. (Siatempe ili provas instali aŭtomatajn kasojn dank'al kiuj poste povos maldungi kasist (in)ojn !). Ili pretendas ke laboristoj estas volontuloj !?! por dimanĉe labori.

Ĉu vere nepras kaj urĝas aĉeti buteron, viandon, purigilojn dimanĉe en supermagazeno ? Ĉu eventuale ne sufiĉas la kvartalaj etkomercistoj kiuj malfacile rezistas konkurencon.

Pri ekonomio, ĉu estos pli profite aĉeti dimanĉe tion kio povus esti aĉetita marde aŭ merkrede ? Mi kredas ke nia aĉetpovo dependas de salajroj aŭ pensionoj enkasigitaj. Kiam ni ne plu havas monon sur nia konto, ni nenion plu povos aĉeti, eĉ dimanĉe !

Mi legis sur gazeto, ke iuj homoj enuas kaj trovas grandan plezuron promeni kun familianoj en supermagazeno, rigardante kun envio la aĉetaĵojn kiujn, finmonate, ili ne plu povas pagi !!! Tiu manko da kulturo estas terura !

Alia demando estas farenda : Kiam supermagazenoj estos ĉiutage malfermataj, kial ne postuli dimanĉan malfermon de administracioj ? Akiro de dokumentoj en urbodomo, en .../...

*Sekvo paĝo 6a*

# Rapport financier année 2006

| RECETTES | | DEPENSES | |
|---|---|---|---|
| **Au CCP le 01/01/2006** | **2862,51** | | |
| Cotisations | 892,00 | Bulletins | 347,49 |
| Repas au VVF | 199,60 | Repas au VVF | 187,60 |
| | | Tenue de compte CCP | 4,00 |
| | | Calendriers | 50,00 |
| | | Panneaux exposition | 550,00 |
| | | Lena Karpunina | 31,56 |
| **TOTAL Recettes** | **1091,60** | **TOTAL Dépenses** | **1170,65** |
| | | **Au CCP le 31/12/2006** | **2783,46** |
| ***BALANCE*** | *3954,11* | ***BALANCE*** | *3954,11* |

## Remarques :

Il reste à utiliser sur la carte de la Société « Copie Plus » 1090 photocopies à 0,055 soit 59,95 Euros.

Les dépenses ne comportent aucun frais administratif : courrier, téléphone, déplacements etc... sont pris en charge par les militants.

Frais d'envoi du bulletin : le bulletin est envoyé dans des enveloppes prétimbrées à 0,61 Euro. La photocopie de chaque page du bulletin revient à 0,055 E Un bulletin de 6 pages revient donc à 0,94 Euro, mais nous tirons plus d'exemplaires (110) que nous avons de cotisants ( entre 70 et 75 ). Des bulletins sont envoyés gratuitement à différents organismes espérantistes, à de nouveaux élèves et à des adhérents momentanément négligents. Certains envoient des sommes supérieures à la cotisation normale. Nous les remercions. Nombre d'abonnés en 2003 : 78. En 2004 : 76. En 2006 : 73.

*Poŝtmarko eldonita de la Bulgara Poŝto en 1987*




## Unua listo de kotizintoj por 2007

Rigardu ĉu via nomo estas en ĉi-suba listo : Ge-Soj :

*BECUE*, BESSIERE, *CARON*, CHALM, *COLOMBEL*, DEFRANCE, *DUBOIS*, DUFEU, *DUFRESNE*, DOMINGO, *DUFLO*, DUVAL, *EL BAHRI*, ERHARD, *EVRARD*, FRESLON, *GIBERT*, GUEROULT, *GUERRE*, GUILMOT, *HELBERT*, HUBERT, *HUET*, JOURDAINE ML, *JOUVIN*, LEBEVER, *LEBRUN*, LECOUVREUR, *LEGUILLON*, LEMARCHAND, *LEMELTIER*, LESUEUR, *LEVESQUE*, LOISEL, *LONGUET*, MARIE F., *MARY*, MICHAUD, *MILLET*, NARDIN, *NICOLAS*, PAUMIER, *POTTIER*, POUPINET, *QUILLAUD*, ROLLAND, *SENECAL*, SERY, *TALPIED*, TURMEL, *ZILLIOX*.

Faru vian ĉekon profite de <u>ESPERANTO-NORMANDIE CCP 283 40 H ROUEN</u> kaj sendu ĝin al la kasisto : P. Quillaud 16 rue Lt de Vaisseau Paris 76120 Grand Quevilly. <u>Abon-Kotizo por 2007 : 8 Eŭroj.</u>

*Poŝtmarko eldonita de la Jugoslavia Poŝto en 1953*



# Ĉu vi deziras forigon de Dimanĉoj ? *(Sekvo de paĝo 4a)*

.../... Prefektejo povas esti tiel urĝa kaj nepra ol akiro de purigilo kaj butero en supermagazeno ! Kaj la infanoj ? Paĉjo ripozas marde, Panjo ripozas ĵaŭde, ambaŭ dimanĉe laboras kaj la gefiloj restas solaj hejme profitante foreston de gepatroj por rigardi televidaĵojn malkonsilindajn por infanoj. Ĉu tio estos la estonta familia vivo ? Konsekvence, eblas supozi ke ankaŭ infanoj iros dimanĉe al lernejo !

Se vi deziras tian evoluon de la socio, verku respondartikolon por defendi la dimanĉan laboron en venonta bulteno.

*Petro KIJO.*

(*) Marché : *Bazaro*. Marché couvert : *Bazarhalo*. Faire le marché : *bazarumi*.
Marché : *konkrakto*. Passer un contrat : *kontrakti*.
*Merkato* : marché dans le sens commercial, financier . Bazar : *ĉionvendejo*.

# Kongreso de SAT-AMIKARO en Artigues apud Bordeaux *(Sekvo de paĝo 3a)*

Krom tiuj ekologiaj asocioj, okazis aliaj prelegoj :

- Japanino Kimie MARKARIAN instruis nin pri « Sorobano », japana tradicia kalkulilo, pri « Origami » kiu estas arto pri paperfaldado.

- Robert MOLIMARD, fakulo pri tabakologio, prezentis sian libron kun titolo : La Fumado.

- Philippe CHAVIGNON, post vojaĝo al Gvatemalo parolis pri « Esperanto kaj indiĝenaj popoloj ».

- Floréal MARTORELL prezentis aktualan esperanto-muzikon.

ATELIEROJ :

Diversaj atelieroj okazis ĉiutage : Marie SAVARY praktikas kaj instruas okcidentan jogon kiu proponas uzadon de konkretaj iloj : spiradoj, masaĝoj, rilaksado spirkonscio, korpokonscio.

Iniciado al vingustumado : tiu perluda kaj teknika ateliero instruiis kiel indentigi ĉefajn aromojn, kiel observi la kolornuancojn. Estis alia ateliero pri regionaj dancoj.

La ĉefa prelego estis tiu de Margareta HANDZLIK : ŝi fariĝis eŭrodeputitino en 2004, okaze de la unuaj eŭropaj balotoj en Pollando.

Kian lingvan situacion ŝi malkovris ene de la Eŭropa Parlamento ? Lingva egalrajteco aŭ nur anglalingva Eŭropo. Malgraŭ grandegaj kostoj, la traduka sistemo en Eŭropa Parlamento ne solvas la problemon de komunikado. Kiuj solvoj eblas ? Ĉu Eŭropa Unio utiligu Esperanton ?

Sekve de ŝia opinio, la 250 partoprenintoj, venintaj el 8 landoj de EU, alvokis la kandidatojn al la prezidanteco de la franca respubliko esprimi sian opinion kaj siajn projektojn pri demando tiel grava kiel la lingva politiko eŭropa kaj tutmonda, kaj aparte, prikonsideri la konstatojn kaj proponojn de Profesoro François GRIN pri « La instruado de la fremdaj lingvoj kiel publika politiko », publigitaj en 2005, en raporto mendita de la Alta Konsilio de pritakso de la lerneja sistemo.

La programo de la distraj vesperoj estis riĉa : ĉiuvespere estis spektaklo. Ni aŭskultis muzikgrupon : Jomo kaj lia grupo kantis en multaj lingvoj : pola, rusa, ukraina, jida, slovaka, cigana kaj esperanta. La koncerto estis gaja, bonetosa kaj vigla. Ni ankaŭ aŭdis la recitalon de Georgo HANDZLIK (la edzo de la pola deputitino), la recitalon de Fabrice MORANDEAU kun lia akordeono. Ni ĉeestis komedion de Max MAUREY « Forlasita » kuditan de Teatra Trupo de Tuluzo. Kantojn kaj poemojn de la 16a jarcento, ni aŭdis de la grupo KANTEM.

La turista parto de la kongreso konsistis el vizito de la urbo Bordeaŭx. Marde, 2 ekskursoj kondukis nin ĉu al Arkaŝona golfeto, kun grimpado al duno Pilat (alt. 117 m) kaj ŝippromenado en la golfo, ĉu al regiono « Entre 2 Mers », meze de vitberoj por malkovri kulturan heredaĵon.

Venontjare dum Paskaj tagoj, la Kongreso ne okazos en Artigues apud Bordeaux, sed en Martigues apud Marseille, kun aliaj esperantistaj asocioj.

Jam rezervu la daton. *Petro KIJO*

---

La 59a kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) okazos de la 12a ĝis la 19a de majo en Parizo kun postkongreso en Liono de la 19a ĝis la 21a de majo.

Kongresadreso : AFCE/UAICF. 59a IFEF Kongreso, 9 rue du Château Landon, 75010 Paris. Tél.: 01 48 53 05 52. Retadreso : sylviane.lafargue@sncf.fr

01.47.18.82.45-